1-a Jaro, N-o 49

APERAS S.A.T. SEMAJNE

3. Septembro 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktoro: N. BARTHELMESS
Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Gvidanto: Ekzekutiva Komisiono de SAT
23, rue Boyer, Paris XX

Administranto: R. LERCHNER
Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Deveno kaj celoj de maroka milito

Antaŭ nelonge en franca parlamento okazis viglaj debatoj pri ekstera politiko. Malgraŭ paroloj de kom-istaj deputitoj, senvualigintaj verajn celojn de l' aventuro, kaj evidenta krima karaktero de l' milito entreprenita en interesoj de certa grupo de kapitalistoj, burĝaj kaj socialistaj deputitoj, kiel konate, sankciis ĝian daŭrigon, voĉdoninte pluajn oferojn je popolaj mono kaj sango. Nun *Fr. Delaisy,* konata burĝa ekonomisto, senmaskigas postkulisan flankon de l' marokaj okazantaĵoj. Priparolante devenon de l' milito, li skribas:

La regiono de rifkabiloj laŭ sia geografia situo prezentas pormilitajn avantaĝojn por ŝtato, aspiranta hegemonion sur la Mediteraneo. Siatempe, *por ne doni al Francio* — oficiala protektoranto de maroka sultano — *eblecon fondi bazon por ĝia aer- kaj submara ŝiparoj,* el kiu ĝi estus povinta minaci al najbara Gibraltar kaj okaze de milito fermi la markolon kaj bari la marvojon al Hindio, *Anglio permesis enkorpigi la regionon en la influsferon de Hispanio.* Kompreneble la hispanoj ne malakceptis tian "grandaniman" donacon, des pli ke la ĉirkaŭaĵoj de *Melilla estas riĉaj je fera erco*), ekspluatebla de l' granda hispana metalindustria entrepreno,* direktata de l' prezidanto de liberala partio.

Tamen interesoj de hispanaj kapitalistoj kunpuŝiĝis kun aspiroj de potenca grupo de ne malpli avidaj francaj financistoj. Rezulte — ĉiufoje, kiam hispanaj trupoj estis penantaj enpenetri en la regionon, la indiĝenoj ricevadis tra alĝeria limo tiom da armiloj, kiom ili bezonis por venke rebati la hispanojn. Finfine la malsukcesoj devigis la hispanan diktatoron Primo de Riveira cedi kaj retiriĝi kaj forlasi ĉian esperon pri anekso de tiu "vespejo". Tamen pro sendanĝereco de Hispanio (kaj ĉefe de Anglio!) *necesis malhelpi al Francio eventualan okupon de evakuata teritorio.*

Hispanoj imitis francojn. Kiam hispanaj trupoj estis malokupontaj la poziciojn, *ili laŭ speciala ordono forlasis tie tutan armilaron, inkluzive municion kaj ekipaĵaron.* Ceteron prizorgis Abd-el-Krim: li kolektis la riĉan akiraĵon kaj, aldoninte ĝin al sia franca batalilaro, bonuzis ĝin por organizi moderne armitan militistaron.

La sukcesoj de Abd-el-Krim entuziasmigis la tutan mahometanan mondon, kaj li mem estus havinta ĉiujn ŝancojn por proklami sin sendependa sultano de l' rifkabiloj se ne sursceniĝo de naftaj potenculoj. Dum lastaj du jaroj agentoj de diversaj naftaj trustoj eltrovis en suda parto de l' apuda regiono, laŭkontrakte "cedita" de maroka sultano al Francio, tutan vicon de naftejoj. Por sekurigi al si ekspluatadon de ĉi fontoj, la registaro de Poincaré decidis okupi la regionon kaj komence de 1924 marŝalo *Lyautey* okupis ĝin per francaj trupoj. La indiĝenoj, kiuj neniam konsideris sin kiel regatoj de Fez'a sultano kaj ignoris liajn kontraktojn, certe ne estis demanditaj pri sia konsento. Ili sin turnis al Abd-el-Krim, tiutempe jam liberiĝinta de "siaj" hispanoj kaj ekribelis en malfronto de francaj postenoj.

Malgraŭ fanfaronado de l' burĝa gazetaro kaj asertoj de oficialuloj ke la ribelo estos likvidita per unu bato, la sangverŝa batalado daŭras jam pli ol tri monatojn, konstante postulante novajn viktimojn. Malgraŭ tankoj, aeroplanoj kaj ceteraj modernaj bataliloj, uzataj de francoj, ilia komandantaro ne nur malsukcesis "pacigi" la kabilojn, sed estas devigata streĉi ĉiujn fortojn por kontraŭstari la atakojn de l' landidoj kaj ne malofte suferas eĉ gravajn malvenkojn. Por vasta publiko, trompata de l' gazetaro, estas enigmaj la sukcesoj de l' ribelantoj kaj la fontoj de ilia provizado per armiloj kaj municio, sufiĉaj por moderna milito, kaj ordinare oni enas trudi tion al insidaĵoj de Germanio kaj rusaj komunistoj. *Delaisy* klarigas, ke tion prizorgas diversnaciaj spekulaciistoj por malaltaj prezoj aĉetantaj la superfluajn armilojn en eŭropaj intendantejoj kaj poste revendantaj ilin altpreze al la kabiloj. Rilate la necesajn monrimedojn, li certigas, ke *Abd-el-Krim estas financata de l' grandaj eŭropaj kapitalistaj entreprenoj, klopodantaj pri eventualaj koncesioj je ekspluatado de fera erco kaj naftaj fontoj.*

La franca ŝiparo sendube estus povinta sufoki importon de l' armiloj sed la blokado de l' maroka marbordo restis preskaŭ sensukcesa, ĉar la armilliverado okazis tra hispana influsfero. Lasttempe, post franca-hispana interkonsento, hispana ŝiparo ankaŭ partoprenas la blokadon. Tamen *neoficiale* ĉiu el la interkonsentintoj emas subteni tiujn aŭ aliajn gentojn, ribelantajn kontraŭ lia konkuranto.

Ĉi tie estas notinda disputo, okazinta dum lasta konferenco pri kontrolado de armilkomercado, karakteriza por internaj malpacoj kaj konkurado, regantaj en la tendaro de imperialistoj. Delegitoj de Anglio, mem lerta armilliveranto, kiam tio profitas al iliaj interesoj, postulis limigon de armilkomercado ĉe la marbordoj de bolanta Hindio. Siavice francaj reprezentintoj postulis la samon por maroka marlando, sed angla delegacio kategorie ekprotestis, asertante ke Maroko kaj Hindio

*) minmetalaĵo

"malsimilas unu la alian". Do, estas evidente ke Anglio ne malhavas intereson je armilliverado al la kontraŭ Francio ekribelintaj rifoj.

Pro kio do oni militas? *Delaisy* respondas: Francio ne bezonas Rif'an ferminaĵon — tiun ĝi havas sufiĉe en Eŭropo kaj Alĝerio. Vere ĝi bezonas nafton. Sed ĉar ĝi posedas nek necesan teknikan instalaĵaron por ĝin prilabori, nek specialistojn, do *malutilas daŭrigi tiom elspezigan militon en interesoj de grandaj naftaj koncernoj "Royal Dutch" kaj "Standard Oil"*.

Tia estas la efektiva kaŭzo de l' "defenda" milito, kiun la ministraro de Painlevé estas entrepreninta, stultigante la publikan opinion per belaj frazoj. La esenco de ĉiuj imperialismaj militoj estas ĉiam kaj ĉie la samaj: la burĝaro, proklamante la militon, unue maskas siajn rabistajn celojn, babilaĉante pri tutnaciaj interesoj, historia aŭ kultura celoj kaj ceteraj "sanktaj" celadoj kaj prisilentante proprajn klasajn interesojn kaj profitojn. Kaj poste, kiam stultigita soldatigitaro malsukcesas sur la batalkampo aŭ simple perdas paciencon kaj ne plu volas verŝi sian sangon, tiam la malfrontaj spekulaciistoj kriaĉas pri patriotismo, pri "ofendita honoro de l' kara patrio", pri "malhonorigita nacia standardo" kaj aliajn stultaĵojn kaj siblas pri perfido kaj koruptemo kaj bonuzas la okazon por ekstermi kaj silentigi sian klasan rivalon — la revolucian laboristaron. Kaj ĝis kiam la popoloj ne sukcesos diferencigi sian veran malamikon kaj ne konvinkiĝos ke la sola justa milito estas tiu kontraŭ la krimeca kaj putriĝanta burĝa sociordo, ĝis tiam torentoj de ilia sango kaj larmoj nutros kaj grasigos la abomenan monstron de l' nuntempa sociordo — la kapitalistan imperialismon!

Nemo.

TRA LA KLASBATALO

Tri polaj komunistoj-junuloj pro partopreno en atenco kontraŭ fifama provokisto estas mortkondamnitaj kaj ekzekutitaj.

En Marseille okazas kongreso de la Socialista Internacio, en kiu la problemo de la garanti-pakto estas akre pridisputata punkto.

Dum laborist-kamparana kongreso sudorientfranca en Marseille, kunvokita de la agadkomitato kontraŭ la milito en Maroko, okazis polica buĉado dum demonstracio, en kiu 50 laboristoj estis grave vundataj, inter ili 2 kom. gvidantoj.

Metallaborista striko en Varsovio pliakriĝis. Ĝenerala striko estas atendata.

La marista striko en Aŭstralio etendiĝas. Kelkaj grandaj vaporŝipoj estas retenataj.

Skizeto el Turkio

Ne ekzistas laborista klaso. — Edukado al religio kaj sklaveco. — Analfabeteco. — Salajroj. — Impostoj. — Eŭropaj modernaĵoj.

Ĉu vi opinias, kamaradoj, ke la Turka popolo ankaŭ helpos vin en la granda batalo kontraŭ la kapitalismo? Lasu tiun ideon kaj demandu eble post 30 jaroj, kiam la nova generacio venos. La plej granda parto de l' popolo estas edukitaj servistoj kaj sklavoj, krom tio profunde kuŝante en brakoj de l' Mohametanismo. Esceptitaj estas nur la urboj konstante tuŝitaj de l' internacia trafiko. La sama popolo, kiu aklamis la alvokon de Padiŝah (Sultano) al la "sankta milito", salutis same la proklamon de la respubliko per Mustafa Kemal Paŝa, kiu cetere faris grandan servon al sia lando, liberigante ĝin de diversnaciaj soldatoj, kiuj sin jam sentis tute hejmece en la diversaj regionoj.

Sed pri tio ne estu hodiaŭ la parolo, ni rigardu iom la ĝeneralan ekonomian situacion. La turka laboristo, (preskaŭ nur helplaboristo) estas homo, kiu laboras tage jam por *60 piastroj 10 aŭ 12 horojn.* Se li estas tiel malsaĝa; sed plej volonte li evitas kiel eble plej la laboron kaj provas vivi per trompado de fremduloj. Sed entute oni ne povas paroli pri laborista "klaso", ĉar ne estas industrio, kiu ĝin kreus. Turkio estas ĉefe agrikultura lando, kaj la malmultaj fabrikoj kaj minoj estas en posedo de okcidenta kapitalo. Post la finkonstruo de la Bagdadfervojo kaj aliaj linioj oni esperas, ke la "kulturo" pli facile enpenetros. La nunaj turkoj en plimulto ne scias skribi kaj legi, ili ofte eĉ ne scias kiom jaraj ili estas, ĉar oni ne trovis necesa gvidi naskiĝmatrikulon. Do, la profesiaj laboristoj estas ĉiuj fremduloj, kiuj per ĉi tiu privilegio salajras 2—3 funtojn potage, en Anatolio eĉ pli. Sed la skuoj de la nuna ekonomia krizo ankaŭ ne haltas antaŭ la turka limo, senlaboreco regas ankaŭ ĉi tie. La nuna registaro en Angora sukcesplene multobligas la doganajn impostojn kun rezulto, ke jam pli malmultaj ŝipoj alveturas la havenojn. Ĉiu vendejo kaj uzino devas doni certan al sia posedaĵo adaptitan sumon, por ke la registaro povu aĉeti aeroplanojn; oni pli perfektigas la armeon ktp.

Kaj la popolo? portas ĉion kaj estas feliĉa ke oni ne devigas ĝin pensi. Nur kelkaj modernaj novaĵoj, kiel la enkonduko de ĉapeloj eŭropaj, likvido de ŝtata subteno al pastraro ekscitas ĝian simplan cerbon. — Virina movado ne ekzistas kaj tre longtempe ne ekzistos, ĝis ne estos rompitaj la trioblaj ĉenoj religio, tradicio kaj eduko. — La orientaj popoloj estos la lastaj, kiujn ni gajnos por nia sennacieca movado, ĉar la spirita evoluo de tiuj rasoj progresas tre malrapide, sed malgraŭ tio ni ne perdu kuraĝon.

H. Pek.

Post la sukcesplena Kongreso en Vieno plifortigu ni ĉiuj la fervoron en varbado por SAT kaj SAT-organoj!

La minacinta Lokaŭto

Venko de la britaj minlaboristoj, cedo de minposedantoj kaj Registaro. — La novaj kondiĉoj. — Impostoj por la laboristaro.

Lasthore la lokaŭto okazonta ĉe la karbministoj en Granda Britio, kaj la sekvanta malordigo de la fervojoj kaj transportado, forturniĝis. Kontraŭvole kaj spite de sia plena rifuzo retiri la avizojn kaj proponojn rilate al la malpliiĝo de salajroj, ambaŭ la minposedantoj kaj la registaro pere de la ĉefa Ministro Bolduin, devis cedi al la volo de la unuigita sindikata movado.

La kondiĉoj novaj, kiujn la posedantoj penis altrudi al la ministoj, estas tiuj, ke la labortago estu plilongigita ĝis ok horoj kaj ankaŭ okazu malpliiĝo de salajroj nuntempaj: Kaj la de la posedantoj donita preteksto pro tiu deviga paŝo estas: ĉar la industrio ne estas sufiĉe profitdona.

Tiun ĉi venkon de la laboristoj verŝajne oni povas atribui al la solidareco de la sindikatmovado. Estis la unua fojo, ke la unuigitaj fortoj de la laboristaro montriĝis en tia grava krizo nacia, kaj se ja estus okazinta la lokaŭto, — kiu povis antaŭdiri la rezulton?

La fervojistoj kaj transportistoj tutkore subtenis la karbministojn, kaj nur necesis ke la telegrafistoj estus enviciĝintaj por ke la tutaj komunikiloj kaj industrioj tuj ĉesiĝu.

Sed la kapitalistaro, kiom oni povas diri unufoje, timis la unuecon de siaj sklavoj. Revolucion ili nek ekŝatas nek volas, kaj opiniante ke la diskreto estas la pli bona parto de braveco, prudente cedis por eviti nunan maltrankvilon, kaj prokrasti iom pli longe la nekontraŭstareblan socian ŝanĝiĝon.

Laŭ la kondiĉoj de la intertrakto inter la registaro kaj la posedantoj oni opinias ke necesas tre ampleksa esplorado de ĉiuj faktoroj rilate al la karbindustrio, kaj pro la kostoj de produktado ambaŭflanke. Por tion efektivigi la ministro Bolduin petis la karbposedantojn, ke ili konsentu la daŭrigon de laboro sub la nuntempa aranĝo dum la venontaj naŭ monatoj. Tion ili cedis, kaj sekve okazas revizio de la regantaj kondiĉoj. Tial, la venontajn du semajnojn, la avizoj nuliĝas, dum reprezentantoj de la posedantoj kaj la registaro diskutos detalojn pri la de la lastnomita proponita subvencio — oni taksis ĝin je 10000000 ĝis 20000000 funtoj.

Kvankam la portempa finiĝo verŝajne estas venko ĉe la laboristaro, la karbministoj ne ricevos iom pli da salajro ol nuntempe, dum la posedantoj pro la subvencio ricevos profiton, garantiatan ĝis neniam antaŭe vidita grado. Ĉiuokaze la impostoj ĉiam kuŝas sur la laboristo kaj la maniero, en kiu la registaro proponas kolekti tiun ĉi malbonegan imposton, estas pliáltigi la prezon de la biero po penco por poento ("pajnto" skribas la aŭtoro. Nekonata al ni vorto! *Red.*)

Sed pro kio ajn la kapitalistaro ŝanĝis sian sintenadon, estas la devo de la la-

boristaro preta sin teni kontraŭ pluaj insidaj atakoj de la posedantoj, kiuj ĉiam kaj ĉiumaniere observas la plej bonan okazon por malpliboniĝi la ekonomian staton de la jam ekspluatatoj. *Ofiro.*

La malsatado de la polit-arestitoj en la Kaunasa Centra Malliberejo

Tri kategorioj de politikaj arestitoj. — Reprenitaj privilegioj. — La malsat-protesto. — Malsolidareco. — La skribe formulitaj postuloj. — Venko de la arestitoj.

Post la ekpreno de la regeco per la kristan-demokrata bloko ekfortiĝis la reakcio kontraŭ la laboristaj organizaĵoj en Litovio. La nigrasanga mano de la pastroj ne trairas, ne lasante signon de detruo, komencante de la civil-profesia vivo, finante ĉe la tiel jam terurega vivo de la arestitoj en la malliberejoj.

En la Kaunasa Centra Malliberejo trovas sin ĉirkaŭ 150 politikaj arestitoj, el kiuj ĉ. 80 estas arestitaj pro laborista politiko, 60 pro pola, 8–9 estas Memelaj „puĉ"istoj. Ili leĝe ĝuas privilegiojn kontraŭ la kriminal-arestitoj. Sed tion ne povis trankvile rigardi la ĉefo Rozminas kaj la korpusgvidinto Brazys de la malliberejo, kaj haviginte al si „per juĝa vojo" skribaĵon de la ministro por justeco, ili raportis ke la polit-arestitoj egaliĝas laŭprave kun la kriminalistoj, kaj — precipe grave — ili intervidiĝu kun la proksimuloj nur per duoblaj kradoj.

Protestante kontraŭ tio, la polit-arestitoj 25. julio ne iris por intervidiĝi kaj ne prenis la aĵojn de siaj parencoj. La 29. julio la protesto transiris en malsat-strikon, kiu estis proklamita unue de la pro laborista politiko arestitoj. Kun ili unuiĝis la aliaj polit-arestitoj, esceptinte la 8–9 germanajn monarkistojn, kiuj per tiu ĉi abomena ago ekmontris, ke ili estas sklavoj per siaj animoj kaj ke ili, pro libero, ne povas kaj ne volas kontraŭiĝi.

Kune kun la proklamo de la malsatstriko estis transdonita postulskribaĵo al la ministro de justeco, al la prokuroro de la Kaunasa distrikta juĝo kaj al la ĉefo de la Kaunasa Centra Malliberejo, en kiu post konstato de la faktoj okazintaj la arestitoj postulas jenon:

1. a) Permesi intervidiĝi kun la parencoj en la antaŭa maniero — ĉe la tablo, — ĉar tra duoblaj kradoj ni neniam konsentos.

b) Redoni ĉiujn ĝis nun havitajn privilegiojn, kaj ke ili ne estu ŝanĝitaj per la volo de kiu ajn oficisto.

2. Finfine ni postulas, por doni konforman seriozan kuracadon al niaj kamaradoj — polit.arestitoj: Leibo Baj, Juozas Skrobulis kaj Agato Zebranskiene, ke oni elveturigu ilin en specialajn kurac-institutojn kaj ne putrigu malsanajn homojn dum kelkaj jaroj, eĉ ne kondamnitaj, kiel okazas rilate al la du lastaj.

3. Plirapidigi la esplorojn kaj la kondamnojn de niaj aferoj, ke ili ne estu intence prokrastitaj dum kelkaj jaroj, kiel estas en la aferoj de la plej granda parto el ni . . . . ktp.

4. kaj 5. Sekvas postuloj pri grandeco de la arestĉeloj, pri plilongigo de la promentempo, pri lavado de la tolaĵo, pri variado en la manĝaĵoj ktp.

30. julio estis elvokita k-do Adamovski, pledanto por la arestitoj pro laborista politiko, al la ĉefo de la malliberejo por intertrakti. La traktoj finiĝis preskaŭ per plena gajno de la polit-arestitoj rericevintaj siajn tutajn estintajn rajtojn, kaj la 31. julio estis finita la malsatado.

I. N. (Kaunasa Centra Malliberejo, Litovio).

Dank' al kio Ruĝa Armeo estas malvenkebla

"Laborist-Vilaĝana Ruĝa Armeo de SSSR" — jen estas la plena nomo de l' Sovetlanda Ruĝarmeo. Kaj ĉi-tiu nomo signifas la fundamentan malsimilecon inter la Ruĝa kaj kapitalistaj armeoj. Se en kapitalistaj armeoj ni havas oficirojn-riĉulojn kaj soldatojn-laboristojn kaj vilaĝanojn, — unuatempe en la Ruĝarmeo ni havas ruĝarmeanaron kaj estraron, same laborulojn.

Popola komisaro por militaj kaj maraj aferoj kaj Prezidanto de l' Revolucia Milita Konsilantaro (Revvojen sovet) k-do Frunze dum la pasinta tutsovetunia kongreso de konsilantaroj (Vsje sojuzny sjezd Sovetov) donis en sia raporto ĉi-ciferon pri la sociala konsisto de la Ruĝarmeo. Li diris, ke ni havas ruĝarmeanojn: 84% da vilaĝanoj, 11% da fabriklaboristoj kaj 5,3% da t. n. "ceteraj" (t. e. intelektulaj laboruloj). Unuatempe ni havas estraron: 56% da vilaĝanoj, 20,3% da laboristoj kaj 23,7% da "ceteruloj". Unuaklasa animo de l' tuta Ruĝarmeo estas ĝia plej grava forteco, iganta ĉi-armeon malvenkebla.

Antaŭdiritan estraron ni havas en Ruĝarmeo ne delongtempe. Dum la revolucia, civita milito en armeo oficis multe da oficiroj, kiuj havas nenion komunan kun laborista klaso, sed kiuj estis por ni necesaj, kiel specialistoj kaj kiuj oficis pro timo aŭ pro militamo, pro deziro militi tutegale kontraŭ kiu-ajn. Nun, kiam armeo havas grandan kvanton da ruĝaj estroj, ruĝoficiroj, — malnovaj carofciroj preskaŭ ĉiuj estas "elpurigitaj". Restis nur tiuj, kiuj tute proletariĝis laŭ sia konscio.

Dum ni havis estrojn, al kiuj Laborista Registaro ne povis kredi, ni en ĉiuj regimentoj de l' Ruĝarmeo, en ĉiuj ĝiaj partoj, krom la estro, havis la politikkomisaron el komunistpartianoj. Ni havis tiel nomatan duestrecon kaj eĉ multestrecon. Nun, puriginte estraron, niaj gvidorganoj decidis preskaŭ en ĉiuj partoj de l' armeo nuligi komisararon kaj enkonduki unuestrecon. Nun ni havas en partoj de l' Ruĝarmeo unu estron, gvidantan unuatempe kaj militecan kaj politikan laboron.

La dua grava eco de l' Ruĝa armeo estas tio, ke ĉiu ruĝarmeano dum la tuta militservo konservas sian civitanan plenrajtecon. Li kune kun la tuta Sovet-Unio voĉdonas dum ĉiuj balotoj, havas siajn delegitojn en lokaj konsilantaroj de l' laboristaj, vilaĝanaj kaj ruĝarmeanaj delegitoj. Ĉiu ruĝa soldato rajtas partopreni en ĉiuj sociaj organizaĵoj, politikaj, sciencaj ktp., krom kontraŭ-revoluciaj. Same li malrajtas partopreni ĉiujn organizaĵojn, oficejojn kaj vendentreprenojn, havantajn celojn ekspluatadi ies laboron. Same ruĝarmeano dum la militservo ne rajtas esti membro de ia profunuiĝo, ĉar, memkompreneble, li dum ĉi servo ne povas esti utila por la unuiĝo.

Militservo en Ruĝarmeo estas nepredeva al ĉiuj civitanoj, eĉ al nelaborulidaro. Nelaborula junularo servas en apartaj lokoj, apartaj militanaroj kaj, ne rajtante havi pafilon aŭ ian alian militilon, nur priservas la armeon, plenumante diversajn laborojn.

Ĉiuj laboruloj trairas militservon en la Ruĝarmeo laŭ tri ŝtupoj: unua ŝtupo — antaŭmilitserva preparado ("doprizyvnaja podgotovka") por la 19 ĝis 21-jaraj junuloj. 21-jaraj komencas militservon en armeo dumaniere: tersisteme kaj en konstantaj arme-partoj kaj post militservo ĉiu civitano restas en rezervo ĝis la 40-jara aĝo.

Servantaj en konstantaj regimentoj militservas du jarojn en pafistaj, kavaleriaj kaj artileriaj partoj, 3 jarojn — en aerŝiparo kaj 4 jarojn en marŝiparo. Post tiu-ĉi servado ili havas servoripozon ĝis 26-jara aĝo kaj post 26 jaroj trafas rezervon.

Servantoj en teritorialaj partoj servas plenajn 5 jarojn, dum kiuj ili estas alvokataj por servado nur po 1—3 monatoj ĉiujare kaj tutan alian tempon vivadas hejme. 26-jaraj ili trafas rezervon. Tiu-ĉi tersistemo de militservado kostas tre malmulte, kaj dank' al ĝi Laborist-Vilaĝana Unio havas malgrandajn elspezojn por sia Ruĝarmeo.

Ĉiuj nacioj estas en la Ruĝarmeo egalrajtaj. Preskaŭ ĉiuj el ili havas siajn naciajn regimentojn, siajn militlernejojn por militestraro. Nacia egalrajteco kaj naciaj arme-partoj estas gravaj fortigiloj de nia armeo.

Komunista partio gvidas tutan Sovet-Union. Same partiaj organizaĵoj gvidas politiklaboron en la armeo kaj helpas al estraro fortigi iliajn partojn kaj gvidi ilian subularon.

Kun helpo kaj gvido de partiaj organizaĵoj ĉiuj ruĝarmeanoj bonkonsciiĝas. Ĉiu regimento havas sian klubon kun bona ejo kaj eĉ ĉiu regimentero, ĉiu roto havas sian klubejon, t. n. "lenanguleton" (anguleton je nomo de Lenin). En tiuj-ĉi lenanguletoj ruĝarmeanoj ricevas ripozon, legas librojn kaj gazetojn, skribas leterojn hejmen, ŝakludas, ludas specialajn militludojn ktp. En samaj anguletoj specialaj politikgvidantoj (politruki) kaj estrojgrupgvidantoj (gruppovody) ĉiutage gvidadas "politikhoron" (horon de politiklernado).

En la klubejoj kaj lenanguletoj laboras ruĝarmeanaj rondetoj kaj rondeteroj (jadra) — politiksciencaj, muzikistaj, dramludistaj, pentristaj, vilaĝmastrumaj ktp. Analfabetaj ruĝarmeanoj lernas en devigaj specialaj regimentaj alfabetlernejoj, kaj neniu ruĝarmeano foriras el armeo hejmen analfabeta.

Krom tio ekzistas t. n. memagemaj organizajoj — rondetoj de MOPR (Internacia Ruĝa Helpo), ODN (Socio "For Analfabetecon!"), Aviaĥim (Socio de aviadamuloj kaj militkemio), rondetoj de radiamatoroj ktp. Ĉiu parto havas t. n. "komsvjazi" — komisionon por ligiĝado, kiu ligiĝas kun vilaĝoj, el kiuj eliris ruĝarmeanoj, kaj kun lokaj regnoficejoj — por helpi en plifortigo de mastrumoj de l' ruĝarmeanoj kaj iliaj familioj. Same en ĉiu parto ekzistas kontrol-mastrumada komisiono, kiu, same, kiel "komsvjazi", memagemaj organizajoj kaj diversaj klubrondetoj, — havas prezidantaron el ruĝarmeanoj mem kaj kiu kontrolas regimentan mastrumadon.

En ĉiu regimento kaj regimentero eldoniĝas murgazetoj kaj ekzistas militkorespondantaj rondetoj. En ĉiu militregiono ekzistas speciala ruĝarmeana gazeto kaj unuatempe ruĝarmeanaj anguletoj ekzistas en lokaj civitanaj gazetoj. Ĉiu ruĝarmeano — militkorespondanto korespondas por sia mura kaj regiona aŭ loka gazeto sen ies kontrolo.

Nun servantaj kaj same finintaj servon (la lastaj — el hejmo) skribas ĉiutage al ruĝarmeana gazeto, en kiu mi oficas, ke ili dankas Sovet-Registaron kaj komunistan partion por tio, ke ili klerigis kaj vidigis militvestitajn laboristojn kaj vilaĝanojn, subpremitajn de l' estintaj cara kaj kapitalista registaroj.

Tiu-ĉi granda politiklaboro, politika bonkonsciigo kaj plena alfabetigo de ruĝarmeanoj, estas la lastaj fortigiloj de l' Ruĝa armeo, kiu ne povas esti eĉ iam kaj de iu ajn venkita.

R. Nikolskij.

Por ke pereu la imperialista milito
Vivu la proletara klasbatalo!

En la lastaj semajnoj la germana kom. partio aranĝis en la industri-regiono "kontraŭ-militajn tagojn". La fin- kaj ĉeftago estis la 9. aŭgusto en Essen.

Jam kelkajn tagojn antaŭe la demonstracio estis malpermesata.

Spite la malpermeso dimanĉon matene miloj (50 000) da "Ruĝaj frontbatalantoj", kaj "Junatakemuloj" akceptataj de "Sipoanoj [1]), estis alvenintaj en Essen. El tuta Vestfalio, el Rejnlando, eĉ el Bremen, Berlin kaj aliaj grandaj urboj kamaradoj ĉeestis. La burĝaro miregis, eĉ ektimis. Tiom multe da revoluciuloj ĝis nun ili ne vidis.

La plej multaj estis vestitaj per la vestajo de l' rusa ruĝa armeo.

Post la paroladoj en la kunvenejo, ekkomencis la demonstracio. Flirtis la ruĝaj standardoj, brilis la pintoj, sovetaj steloj, en la suno, eksonis la amasaj kantoj!

Sed kio estas tio? Amaso da "sipo"-anoj kaj policistoj estis alvenintaj per aŭtomobiloj kaj baris la stratojn.

"La demonstracio estas malpermesita!" Ĉu vi komprenas, proletaro? Estas malpermesite en libera respubliko demonstracii kontraŭ la milito!

Dum la sama horo la "Regna standardo" de distrikto Vestfalio festis en Gelsenkirchen (en la proksimeco de Essen) la konstitucian tagon. Ministro Severing mem ĉeestis kaj paroladis pri nia "bonega konstitucio" (kiu garantias liberecon de parolo, bildigo kaj skribado). Tiu festo finiĝis per la kantado: Germanio super ĉio!

Tiam ekkomencis balo.

W. St., Essen (4567).

[1]) Sipo = germana polico regna.

La Festo de Laboro en Riga

Pasintan jaron Centra Oficejo de Riga'aj profunioj aranĝis la unuan "feston de laboro", kiu bone prosperis. Por ke la programo de ĉi-jara festo estu pli riĉenhava, la Centra Oficejo ekkomencis la preparan laboron jam antaŭ du monatoj. Estis verkita aparta festsceno. Ĝin senlace kaj sindone studadis homoj dum la sola libertempo post taga malfacila laboro en fabrikejoj, metiejoj, vendejoj, kontoroj, havenoj ktp. Entute ĉiu partoprenanto (kaj ili estis pli ol cent kamaradoj) faris ĉion eblan por pli konscie kaj pli bone aranĝi la feston. Laborista junularo ĝojigita eĉ ne bedaŭris sian noktan ripozon, ornamante la festlokon por venonta tago. Infanoj eĉ tiuj laŭscie penadis almeti siajn manetojn je komuna kolektiva laboro.

Fine venis la tago de festo, la 12. julio. Estis dimanĉo. Hela suna tago. Ŝajnis ke eĉ la naturo per siaj brilegantaj sunradioj ekintencis kroni la ripoztagon de la homoj, post semajna malfacila ŝvitlaboro en fabrikejoj kaj metiejoj ekdezirintaj pasigi la libertempon en freŝa saniga aero. Jam frumatene direktiĝadis al "Saules Darzs" (ĝardeno de la suno) verdornamitaj ŝarĝaŭtomobiloj kaj granda aro da piedirantaj gekamaradoj kun familianoj ĝojegaj je bela tago de festo. Ĉiuj grupiĝis antaŭ la ĝardenpordego bele ornamita kaj surhavanta belan afiŝon "Festo de laboro".

Sed ho ve, la pordego fermita! Ĉirkaŭas ĝin aro da policistoj, kiuj sciigas ke eniro malpermesita, ĝis venos la respondeca gvidanto posedanta festpermeson de la prefekto. Sed evidentiĝis ke la gvidanto-sekretario de la Centra Oficejo de Riga'aj profunioj, k-do S. Revald, pasintan tagon posttagmeze surstrate estis arestita. Ĉiuj klopodoj pri anstataŭanto restis senrezultaj, ĉar "malaperis" kaj ne estis troveblaj plu en Riga nek prefekto nek vicprefekto. La festanoj ekscitiĝis. Tamen nenio helpis. Disigitaj kaj forpelitaj de policistaĉoj ili pasigis la tagon en apudaj arbaroj.

Kamaradoj, mi opinias ke komentarioj estas superfluaj, ĉar ni ja vivas en la "libera demokratia" lando.

Neŭtralulo.

Protokolo

de la Va SAT-Kongreso en Wien 11.—15. aŭgusto 1925

Dua laborkunsido 11. aŭgusto posttagmeze

K-do *Richter* malfermas. K-do *Drezen* (Moskvo), jus alveninta, salutas la Kongreson nome de SEU kaj de sovetlandaj SAT-anoj. Li sciigas, ke 60% de SEU-membroj estas anoj de SAT kaj parolas pri la praktika apliko de esperanto en Sovetio, pri la eksterlandaj esperantistoj lastatempe vizitintaj Sovetion (sveda kaj germ. delegacioj). Supozeble estos okazigebla la VI. SAT-Kongreso en *Leningrad*, por kio kore li invitas.

K-do *Scheithauer* protestas kontraŭ la agmaniero de la Aŭstria registaro, kiu ne donis la envojaĝpermeson al niaj rusaj kamaradoj. Kiel signo de solidareco li proponas elekti k-don Drezen kiel prezidanton de la Kongreso. *Tiu propono estas akceptata kun granda aplaŭdo.* Komencas nun la

Debato pri la raporto de k-do Lerchner (E. K., Administracio),

kiu estas interrompata per la redaktora raporto pri "Sennaciulo", ĉar oni en la debato jam anticipas punktojn, kiuj koncernas la redakcion de "Sennaciulo".

Raporto de la redaktoro de "Sennaciulo".

K-do *Barthelmess*: La propra vivo kaj la propra karaktero de SAT forte montriĝas kaj vive pulsas en la semajna gazeto de SAT, "Sennaciulo". Tamen ne tiel unueca ĉiam montris sin la spirita vivo, ke la redaktoro havis simplan, facilan laboron. Ofte la kunlaborantoj faris al li kapdolorojn. Pro la noveco de la entrepreno la redaktoro mem komence ne havis klaran bildon, kiamaniere prezentiĝos la nova gazeto, tiom diferenca de la malnova monata S. R. La bildo de la gazeto estis difinita per la kunlaborantoj. La gazeto ĉefe akcentis la karakteron *serve-praktikecan* de SAT, atentis pri tio, ke SAT volas esti interhelpilo utila al la diversaj interhelpaj organizajoj tutmondaj proletariaj. Dume la *eduk-kleriga* flanko de SAT iom estis puŝata malantaŭen en "Sennaciulo". La ĉefartikoloj ne plu prezentis ĝeneralajn konsiderojn pri sennaciismo, sed traktis gravajn, aktualajn temojn el la mondpolitika aŭ socia movado. La raportoj (la esenca parto de la gazeto) venis abunde, bedaŭrinde ni parte devis uzi tradukojn, kvankam ni preferus nur ricevi originalajn raportojn. Ni dezirus krei reton de laboristaj korespondantoj, liverantaj al ni la raportojn, trans la tuta tero. La fakto, ke sovetlandanoj plej ĉefe kaj plej intense kunlaboris ĉe "Sennaciulo", iom ĉagrenis kelkajn okcidentlandanajn legantojn pro la tendenco reganta en Sovet-Unio. Tamen ili konsideru, ke ne ĉiuj artikoloj verkitaj de sovetianoj kaj aperigitaj en S-ulo, estas skribitaj de komunistoj-partianoj. Nur manko kelktempa de artikoloj el aliaj regionoj devigis min, enpresi iafoje tro multe da artikoloj el Sovetio. La nuna stato estas pli kontentiga, ĉar mi momente disponas pri tiom da materialo, ke mi tre varie povas kompili ĉiun numeron de S-ulo. En la gazeto mi donis liberan parolrajton al ĉiuj niaj membroj per la rubriko "Diskutejo". Precipe en la lastaj n-oj vi povis konstati tion. En la "lingva afero" mi devis esti tolerema, ĉar mi estis ligita per la decidoj de du kongresoj. Mi do devis toleri kaj respekti la tendencon fundamentisman kaj same la tendencon reformeman. Tamen mi ne toleris la enkondukon de fundaj ŝanĝoj en la artikoloj aperigitaj. Mi atendas decidparolon de la Kongreso en tiu rilato, por ke mi havu precizan direktivon kaj sciu kiel agi. Ni aranĝis fakon "La Lernanto", kiu aperas monate kaj certe kontentigas tiujn, kiuj ankoraŭ ne estas perfektaj en la lingvo, kaj ankaŭ ĉiujn, kiuj deziras iom facilan legajon. Aperis ĝis nun per "La Lernanto" 42 rakontoj kaj anekdotoj pli malpli longaj

el multaj lingvoj kaj ankaŭ iaj originalaĵoj. 8 lingvaj demandoj estas pritraktitaj en ĝi (el kiuj 6 gramatikaj kaj 2 vortaraj). — Plej grava pruvo de la valoro de S-ulo estas la statistiko pri enpresitaj artikoloj el S. en la tutmonda nacilingva prol. gazetaro. Aperis ĝis 31. 7. 25 sume 156 artikoloj en 109 gazetoj (lastjare 146 en 66 gaz.). Bone funkciis la tradukservo speciale en Francio. El la 156 artikoloj 52 (do ⅓) aperis en Franclingvio (37 en francaj, 9 en svisaj, 7 en belgaj gazetoj), 32 aperis en rusaj gazetoj, 17 en germanaj ktp. Rimarkinde estas, ke en unu hungarlingva, en Rumanio aperanta gazeto ĝis nun aperis 14 artikoloj-tradukoj el S-ulo. Plej ofte oni uzis la art. "Blanka teroro en Polio", aperinta en n-o 2 (7-foje en 5 div. lingvoj). El "Senn. Revuo" oni elĉerpis lastjare 6 artikolojn en 4 div. lingvoj. Unu eĉ aperis broŝurforme. Oni devas krome konsideri rigardante la statistikon, ke ĝi estas nekompleta, ĉar multaj k-doj ne sciigas nin pri aperintaj tradukoj.

Espereble ni en estonta jaro eĉ havos pli bonajn rezultojn. La bona nuntempa alfluo de materialo por S-ulo estas promesplena. Tiamaniere ni povos plibonigi la enhavon de S-ulo kaj ankaŭ liberigi de tendenceco, kiun kaŭzas mallerte verkitaj artikoloj de kelkiuj. Per via *ĉies* kunlaborado ni certe sukcesos krei tian gazeton, kian ni ĉiuj deziras!

La debaton pri la raportoj malfermas k-do *Klopfleisch*-Düsseldorf, plendante pri la konduto de la Komfrakcio en Bruxelles.

K-do *Deubler*-München plendas pri la aliĝo de SAT al Intern. Lab. Helpo, riproĉas al la E. K., ke ĝi silentadis en Bruxelles, kiam oni diskutis pri la propono. Ĉar oni devus scii, ke la socialdemokrataj partioj malpermesas al siaj membroj la aliĝon al tiu organizaĵo. Plue li deziras skriban administran (precipe kas-) raporton (antaŭan preson en la gazeto). Plendas, ke al E. K. apartenas preskaŭ nur anoj de Komintern. Plendas, ke oni en la frakciaj kunvenoj de la Kongreso parolas pri ĝeneralaj SAT-aferoj, anstataŭ pri pure propagandaj aferoj (en partiaj rondoj). Ke E. K. ne sufiĉe ofte avertis pri la kandidat-deklaro kaj elekto de nova Direkta Komitato.

K-do *Drezen* (ekster tagordo) komunikas okazigon de salutparolado al la Kongreso de Radio-stacio en Moskvo ĵaŭdon tagmeze. *(Aplaŭdoj.)*

K-do *Bässler*-Leipzig defendas la kom. frakcilaboron kaj admonas la aliajn frakciojn tendencajn, same agi. Bedaŭras kaj kondamnas la mispaŝon de la anarkistaj k-doj, rifuzintaj fondi frakcion el SAT-membroj.

K-do *Zawada*-Lublin malkontentas pri la enhavo de la gazeto. SAT devas esti superpartia. S-ulo donas tro multe da loko al unu politika tendenco, al artikoloj el unu lando. Mi havas pruvojn, ke oni ne enpresis certajn artikolojn.

K-do *Drezen* parolas pri "unuecfronto" per SAT. Kvankam "unuecfronto" nur estas fantomo momente, SAT povas fari gravan paŝon en la direkto al estonta unueca movado. Kia diferenco inter simpla *laboristo* komunista aŭ socialdemokrata? Oni disputas ne pri *taktiko*, sed pri *teorio*. La laboristoj finfine forpelos ĉiujn teoriojn kaj agos, kiel postulas la taktiko. Kaj tiam estos restarigita la unuecfronto; aliel nia movado, la laborista movado entute ne sukcesos venki. Ni ne disiru, ni restu kune. Ni havas jam gravan komunan econ, ni havas *komunan lingvon*. Sennaciulo enpresigu *faktojn*, ne teoriajn artikolojn, ĉar faktoj diras la veron kaj povas ofendi neniun.

K-do *Lehmann*-Dresden salutas nome de Dresdena SAT-anaro. Plendas pri tro ofta aperigo de komunistaj artikoloj en S-ulo kaj pri tro frua fermo de la kandidat-listo por D. K. -elekto. Li kaj k-do *Klopfleisch*, kvankam ne volas defendi k-don Goldstein, kies agon ili ne scias ĝuste pritaksi, malbonjuĝas la agadon de la Kongreso en Bruxelles.

K-do *Barthelmess* defendas la redaktadon de S-ulo. La forta kunlaborado de k-doj el Sovetio donis specialan karakteron al S-ulo; tamen oni ne povas paroli pri frakci-tendenco, kiel faras k-do Zawada. Ne ĉiuj artikoloj el Sovetio devenas de komunistoj.

K-do *Guma*-Paris opinias, ke sennaciismo ne povas ekzisti per si mem, sed estas vivigata per la kunlaboro de la div. tendencoj. Ni estas devigataj akcepti ĉiujn tendencojn. Postulas liberecon ne nur por kom. kaj soc. dem. frakcioj, sed ankaŭ por anarkistoj. Li, kvankam bedaŭras, tamen senkulpigas la fondon de aparta organizajo TLES. Parolas pri rifuzitaj anarkist-tendencaj artikoloj.

K-do *Lanty*-Paris: Regas konfuzo pri la karaktero kaj la laboro de la frakcioj. En la kadro de SAT ne ekzistas frakcioj. Sed tamen la SAT-anoj rajtas kunveni aparte, por prisdiskuti siajn proprajn komunajn aferojn. Frakcia laboro povas esti tre fruktodona. Kial la anarkistoj ne fondis tian frakcion el SAT-anoj? TLES estas aparta organizajo. La kom. tendenco montriĝis en la gazeto, ĉar la komunistaj k-doj estis pli agemaj.

K-do *Feith*-Wien aludas sian proponon pri dezirindeco de superpartia skribmaniero en la gazeto. K-do *Lerchner:* SAT estas kulturorganizajo. Se vi zorgas tre atente, tiam forrestos disputpunktoj. Iu parolis pri "estroj" en SAT. Ni ne havas vere estrojn en SAT, sed laborsklavojn. Por la elekto de DK. la Dresdenanoj anonciĝis tro malfrue. Ili havis sufiĉe da tempo antaŭe por anonci sin. Por la elekto de DK. ni devas nepre trovi alian vojon, ĉar la nuna elektmaniero estas tute malpraktika. K-do *Guma* legas liston de rifuzitaj (laŭdire) artikoloj kaj transdonas al k-do Barthelmess. Por pruvi komunismemon de SAT, li legas tradukon de la antaŭparolo de raporto, kiun k-do Lanty sendis al Komintern antaŭ unu jaro.

K-do *Lanty* respondas, ke tiu raporto estis *privata* afero, ke li do rajtus pri ĝi ne respondi publike. Li ne pritraktos la etikan flankon de la fakto, ke kontraŭuloj uzas privatan dokumenton rabitan. Sed tial ke li estas certa, ke k-do Guma ne havas ian ajn respondecon en la rabo de tiu dokumento, li konsentas doni klarigojn pri sia raporto al Komintern. Li diras, ke li pledis advokatece kaj sekve uzis ĉiujn argumentojn konvinkokapablajn. La riproĉoj de k-do Guma, bazitaj sur la dirita raporto, ne respondas al la faktoj. Malveras, ke la komunistoj havas la plimulton en la E. K. de SAT. La vero estas, ke post la eksiĝo de Lanty restas en ĝi nur *unu* komunista partiano: k-do Glodeau, la aliaj E. K. anoj estas ĉu anarkistoj, ĉu senpartiuloj. La pli vigla kunlaborado de komunistoj ne estas riproĉinda, sed imitinda, konkludas k-do L.

K-do *Barthelmess* respondas al k-do Guma, ke al li ne konataj estas tiuj cititaj artikoloj, kiuj estas laŭdire rifuzitaj de la redakcio. Li deziras, ke oni esploru la aferon.

K-do *Hejda*-Wien proponas, ke oni sendu plendon al la Aŭstria registaro pro neenlaso de niaj rusiaj kamaradoj.

K-do *Slezak* subtenas la proponon kaj petas unuaniman akcepton.

La propono estas unuanime akceptata.

K-do *Lanty* demandas la Kongreson, ĉu necesas elekti komisionon; kiu esploru, ĉu kaj kiaj artikoloj estas rifuzitaj de la redaktoro.

K-do *Feith:* La kontraŭsovetiajn artikolojn kontrolu.

K-do *Barthelmess:* Tiajn artikolojn mi entute ne ricevis.

K-do *Richter* konstatas, ke la Kongreso, insistas elekti komisionon el Leipzig'aj kamaradoj (sidloko de la redakcio).

K-do *Zavada:* Ĉar ni ne konas la Leipzigajn k-dojn, la proponkomisiono zorgu kaj la Kongreso interkonsentu poste.

K-do *Richter:* La proponkomisiono same ne konas la k-dojn. La Leipziga grupo komisiu mem tri aŭ kvar k-dojn el la diversaj tendencoj, kiuj kontrolu la artikolojn rifuzitajn.

Tiu propono Richter estas akceptata.

Sekvas sciigoj de la Loka Kongres-Komitato pri vesperaj mitingoj kaj debato pri konstituo kaj labormetodo de la propon-komisiono.

Tria laborkunsido, 12. aŭgusto matene.

Post legado de salutoj sekvas la

Raporto de Sennacieca Revuo kaj de Eldona Fako

K-do *Barthelmess* (anstataŭ la redaktoroj, kiuj ne povis veni): Ankaŭ nunjare ni bedaŭre ne povas ĉeesti mem por persone prezenti al vi la jaran raporton pri nia redakta laboro en S.R. Tamen ni mem estus malkontentaj pri nia laboro, se ni bezonus nepre ĉeesti la Kongreson kaj persone pledi por nia revuo — ni ĉiam celis, ke la revuo mem pledu por si, ke ĝi atingu tiun gradon de la kvalito, kiu permesus ne uzi la helpon de advokatoj. Ni bedaŭrinde ne povas tuj aŭskulti viajn sugestojn pri nia laboro, sed ni estas certaj, ke tiuj sugestoj venos en la formo de viaj konkretaj kunlaboraĵoj, per kiuj vi helpos al ni forigi niajn mankojn. Ĉar nia laboro super la revuo estas samtempe via laboro, ĝi estas laboro kolektiva. — Kiel pasintjare nia tasko restis kaj restos por sekvantaj jaroj — flegi la ĝermojn de la naskiĝanta literaturo sennacieca. Fakto konstatinda estas, ke aperis sufiĉe multe da rakontoj pasintjare en nia revuo, kiuj jam havas la ĝermojn. Ankoraŭ karakteriza trajto estas, ke la aŭtoroj de niaj originalaĵoj ofte sin kaŝas per pseŭdonomoj. Tiuj nomoj eĉ laŭsone apartenas al neniu nacio, neniun nacian nomon ili memorigas. Ili estas la sonoj el la naskiĝanta sennacieca Novo. Ke niaj originalaĵoj valoras, montras la fakto, ke la granda ĵurnalo "L' Humanité" aperigis tradukon de originala rakonto el nia revuo. Kaj eĉ la "neŭtrala organo" Esperanto, dum du jaroj silentinta pri nia revuo, rekonas la diversfakan forton de nia SAT-kolektivo! — Pasintjare la revuo iom kreskis en sia amplekso, iom plibeliĝis pro pli multaj ilustraĵoj kaj ornamaĵoj. Sed tiu kresko ne korespondas al la kresko de nia laboremo kaj al la pliampleksiĝo de nia programo. La sekvantaj ciferoj tion bone ilustras: En 11 numeroj de la revuo aperis 97 verkoj, do je 15 pli multe, ol dum la tuta jaro antaŭa. Belarta prozo, malkreskis de 50 ĝis 33%, cedinte 17% parte por la pliampleksiĝo de l' scienca fako (nunjare 20%, antaŭe 17%) kaj pliparte al la nova — pedagogia fako, kiu enhavis 14% de ĉiuj aperintaj verkoj. Ne ŝanĝiĝis la kvanto de poeziaĵoj (25%) kaj de priliteraturaj skizoj (8%). Tiuj ciferoj plimalpli permesas al ni konkludi, ke nia revuo montriĝis ĉefe literatura kaj ke la fakoj scienca kaj pedagogia aperas en ĝi dume nur kiel fakoj kompletigaj: Ĉefe la amplekso de la revuo ne permesas, pligrandigi tiujn du fakojn, kvankam rilate al la pedagogia ni suferis ankaŭ ioman mankon de kunlaboraĵoj. Ŝajne ni ne jam sukcesis trovi necesan direkton por ĝi, kaj ni tre deziras, ke en via diskuto vi helpu trovi tiun vojon. Nia pedagogia fako devas esti destinita ne nur por pedagogoj. La problemoj de edukado apartenas al tiuj, kiuj turmentas nin dum la tuta vivo (lernejo, memedukado, propraj infanoj, socia laboro). Ni ne lasu tiujn zorgojn sole al pedagogoj, ni ĉiuj estu kunlaborantoj de nia pedagogia fako. En la scienca fako ni povas noti formiĝon de soci-scienca subfako. Ĝi karakterizis sin per 7 aperintaj artikoloj, ĉiuj tradukitaj, dum el 13 aliaj sciencaj artikoloj nur unu estas tradukajo. — Pri la lingvaĵo de nia revuo ni ripetu, kion ni diris en la antaŭa raporto: nia lingvaĵo devas ĉefe respondi al la peresperanta karaktero de nia revuo; ĝi ne povas esti stagna, dumkiam la vivo kaj la tekniko progresas; ĝi ne povas salti antaŭen, postlasante post si la vastan legantaron; ĝi ne povas aliflanke resti sur la nivelo de lingvokomencantoj — traktante pri la temoj sciencaj kaj teknikaj, ni atendas certan lingvoposedon ĉe nia legantaro. — Lastjare 39% de verkoj aperintaj estis originalaĵoj, nunjare ni jam havas 46% da ili. Tio estas jam rezulto el

la ekzisto mem de nia revuo: ĝi vekas la literaturajn kapablojn en nia SAT-medio, ĝi ebligas al ili sin ekzerci kaj plialtigi la artan kvaliton de siaj verkaĵoj. Ni konstatas tendencon de kreskado de originalaj verkoj. De vi dependas, ĉu estontjare eĉ plifortiĝos tiu tendenco, ke fine tiu tendenco fariĝu definitiva sukceso sur nia vojo al sennacieca literaturo. *Eldonkooperativo.* Malgraŭ teknikaj malhelpoj, financaj malfacilaĵoj — ni devis vivteni semajnan gazeton kaj monatan revuon — ni sukcesis eldoni diversajn novajn librojn, inter ili unuavice la luksan, ampleksan Kantaron. Per du novaĵoj ni esperas plisukcesigi la funkciadon de nia Eldona Fako: per eldono de akcibiletoj (unu- kaj duondolaraj), kiuj donu certan garanti-fondon al la kooperativo kaj signu pli klare la kooperativan karakteron de la entrepreno, kaj per aperigo de perioda "Biblioteko de Sennaciulo", en kiu estu aperigataj diversfakaj verkoj, literaturaj-beletristikaj, sciencaj, soci-politikaj kaj — laŭ nia projekto — ankaŭ pedagogiaj. Se vi varbas fervore por tiu entrepreno kaj subtenas per propra via abono (ni bezonas kelkcenton da certaj abonantoj), ni ankaŭ tiurilate povos sukcesi kaj pliviglígi nian eldonagadon. Temas kompreneble pri malgrandaj verketoj, cetere prefere legataj, ĉar por grandaj publikaĵoj bedaŭrinde la mono mankas. Ni esperas, spite la altaj kostoj de du gazetoj, ankaŭ prosperigi nian eldonan fakon.

Debato

K-do *Bässler* atentigas pri la alta propagand-agita valoro de la Prol. Kantaro eldonita de ni. Kompartio Germana oficiale postulis tradukon de kantoj por utiligo en germanlingvaj kantaroj.

K-do *Revo* plendas pri maldiligenteco de k-doj en kunlaboro al S. R. Tre malmulte da ekonomi-sciencaj artikoloj aperis. Tamen ili estas gravaj, ĉar la proletara klasbatalo staras sur ekonomia bazo. Mia tiurilata alvoko ne estis atentata eĉ de unu kamarado. En ekonomia kampo la disputoj pro tendenco ne estas, aŭ estas tre malgrandaj. En tiu kampo ni bezonas tradukojn de valoraj verkaĵoj. Por ni kiel proletoj tiu kampo estas treege grava.

K-do *Zavada* ankaŭ deziris, ke oni pli multe da loko dediĉu al sociologiaj artikoloj. Deziras eldonon de meti-sciencaj libroj. Opinias, ke la Kantaro estas tro ampleksa kaj pro tio tro multekosta. Deziras, ke oni dividu la Kantaron laŭ nacidevenaj partoj, tiamaniere ebligante la aĉeton de diversaj pli malampleksaj partoj. Deziras aperigon de gravaj tradukaĵoj. Kiam aperos la "Etiko"?

K-do *Feith*: Mankas ekonomi-sciencaj artikoloj. Pri tio kulpas la spirito de la membraro. Kial oni moke parolas pri iuj profesoroj, kiuj donas konsilojn? Ni ne forpuŝu ilin. Proponas pli grandan propagandon inter socialismaj intelektuloj, ĉar ni bezonas ilian kunlaboron.

K-do *Revo:* Por publikigi grandajn verkojn ni nuntempe ne estas sufiĉe fortaj, ni kontentiĝu publikigi eltiraĵojn, ĉapitrojn, ekzemple de Marksa "Kapitalo" k. a. verkoj.

K-do *Guma* opinias malaprobinda la dividon de la Kantaro en diversajn partojn kaj kontraŭ la sennacieca spirito.

K-do *Barthelmess:* Momente ni ne kapablas eldoni grandajn tradukojn nek specialistajn verkojn, nur legotajn de kelkaj k-doj (meti-sciencajn librojn proponitajn de k-do Z.). Pro sama kaŭzo ne aperis la "Etiko". Kial la anarkistaj k-doj ne kolektis, laŭ nia ofta alvoko, monsumojn por la eldono de tiu verko (per antaŭmendoj ktp.) anstataŭ uzi la monon por eldono de nova gazeto (konkurenca al nia gazeto)? — La Kantaro ne havas valoron, se ĝi estos dividita laŭ nacidevenaj partoj. Ĝi perdos sian sennaciecan karakteron.

K-do *Ultmann*-Wien anoncas fakkunsidon de Instruistoj, resp. Instruantoj.

K-do *Pakosta*, reprezentanto de Ĉeka Kom. Lab. Partio, salutas la Kongreson.

Lingvaj demandoj

K-do *Feith*: Mi ĝojas, ke la granda plimulto kondamnas la konfuzigojn kaj novigojn de nia lingvo kaj turnas sin kontraŭ la persongustaj ŝanĝoj. Sed la redaktoro devas havi la eblon, forigi ĉiujn atakojn al la lingvo. La ido-sufiksojn ni ne bezonas apliki. La finaĵo *e* (balde), kvankam ne kontraŭfundamenta, estas malkonsilinda, ĉar oni tiom longe uzis la alian finaĵon. Kion diru la komencantoj? *Konfero, difero* estas kripligitaj formoj neaplikindaj. En laŭfundamenta Zamenhofa Esperanto oni povas pritrakti la plej malfacilajn temojn. La kamaradoj fuŝas, ĉar ili ne legas la verkojn de Zamenhof. Mi proponas rekomendon de la fundamentaj Zamenhofaj legaĵoj (haveblaj en Paris) per la gazeto. Li plue parolas pri la pura lingvo fundamenta uzita en la gazeto "La Esperantisto" de D-ro Pfeffer. Li opinias, ke se ni daŭrigus kiel ĝis nun, venus la momento, ke iu taŭga, kapabla k-do fondus novan asocion kaj redaktus novan gazeton laŭ pura, fundamenta stilo kaj lingvo. Oni ne troseriozigu la tekston de la gazeto. Ankaŭ la laboristo volas legi belajn, simplajn tekstojn en la gazeto. Neologismojn kaj novajn formojn rajtu forstreki la redaktoro. Neologismojn oni nur uzu en okazo de nepra neceso. Oni ne enuigu la legantojn de nia gazeto. Politiko devas resti for. — En "Petro" mi bedaŭras la citon de novaj sufiksoj nenecesaj.

K-do *Richter* proponas kunfandon de la propono de k-do Feith entenita en lia referato, kun la jam faritaj samtemaj proponoj. (*Konsentite).*

K-do *Svidt*-Bratislava petas, ke oni donu al la redaktoro(j) precizajn instrukciojn. Li opinias, ke la kurslibreto "Petro" ne estas sufiĉe akomodita al la hungara lingva uzo kaj tial malfacile utiligebla en kursoj gvidataj de li.

La diskuto estas interrompata pro la progresinta tempo.

Fakkunsidoj: 5a h. Instruantoj, 6a h. Kom. frakcio, $^1/_2$8a h. (alimatene) LEA-oj (naciaj lab. org.), vendrede 5a h. Naturamikoj.

Kvara laborkunsido, 12. aŭgusto posttagmeze

Daŭrigo de la debato pri lingvaj demandoj

K-do *Krstulović*-Wien: K-do Feith ne sufiĉe konsideris la realan situacion. Ni fakte ne havas unuecon en la lingvo. Diversmaniere estas instruitaj la kamaradoj. Ekzistas tiom da lab. esp. organizaĵoj kaj tiom da lingvinstruaj metodoj. Ankaŭ ni ne havas propran vortaron.

K-do *Revo:* La nuna sistemo de enkonduko de novaj vortoj kaj afiksoj kondukas nian lingvon sufiĉe rapide al abismo, kiu jam nun estas videbla. Ni lernu el la historio de lingvo internacia, kiu avertas nin (Volapük). Ekzistas "neŭtrala" Esperanto-movado. Sed SAT estas en la tuta esp. movado la plej aktiva, antaŭenpuŝanta elemento. La okuloj de ĉiuj pli kaj pli direktiĝas al SAT: Komparu la hodiaŭan Kongreson kun la fakkunveneto en Praha (1921). Ni havas en niaj manoj la tutan kulturan heredaĵon, kiun lasas al ni la burĝa klaso. Nur Esperanto en la manoj de proletaro povas esti savata. Nia respondeco tial estas multege pli granda. Se ni ne atentas pri la pureco de la lingvo, tiam estas nia kulpo, se Esperanto eble havos la saman sorton kaj destinon kiel Volapük. Ni turnu nin kontraŭ ĉiuj novigoj en nia lingvo. K-doj plendas, ke ili ne povas instrui, ĉar novaj formoj aperas. Nur estas malmultnombraj ja la futuristoj. Nur kelkaj — la verkintoj — estas por la novigoj, la legantoj estas kontraŭ. Nia Kongreso havas la povon forigi tiun staton. La redaktistoj devas havi gvidlinion. Ĝis nun ni ne povis riproĉi pro la antaŭaj decidoj, kiuj vokis al lingva toleremo. Toleremo ĝis kia grado? Toleremo estis tro granda dum la lasta tempo. Esperanto devas evolui, sed ĝi devas evolui en certe difinitaj linioj. Estas strangaj revoluciuloj tiuj k-doj, kiuj opinias ke la plej bona kampo por la agado estas la lingvo. Kontraŭ ili ni devas rigore paroli. Rilate la lingvon tre konservema devas esti la lab. klaso. Ni devas havi lingvon, kiu estu komprenata dum kelke da jaroj kaj jardekoj, de tiuj, kiuj lernas. Eĉ Ido havas periodon de "stabileso". Tri kategorioj de lingvaj formoj estas nepre forstrekendaj: 1) Persongustaj novigoj, 2) Konfuzigaj simpligoj, 3) Superfluaj esprimoj. Ni tute ne ankoraŭ elĉerpis la lingvan materialon de Esperanto. Bedaŭrinde nur malmultaj konas la verkojn de Zamenhof, ĉar la plejmultaj ne estas multjaraj, sed kelkjaraj esperantistoj. Ili do ne havas lingvan tradicion. Tial mi proponas (kiel deziresprimo), ke estus bone, se Sennaciulo kiel felietono almenaŭ dummonate publikigus artikolon aŭ tradukajon de D-ro Zamenhof aŭ alia konata aŭtoro. Ankaŭ en "La Lernanto" oni povas fari tion. Oni devas iri en la profundecon, sed ne en la larĝecon. Tamen necesaĵojn (ekz. "end") ni ne forpuŝu. Kontraŭ necesaj novigoj ni ne devas paroli, ĉar aliel ni estus reakciuloj. Ni devas plifaciligi ĉiam al niaj lab. lernantoj la lernadon de la lingvo, ĉar lacaj post laboro ili venas hejmen, do ni ne kreu artefaritajn malfacilaĵojn. Por la lingva gvidado de la organoj ni bezonas "ŝtalan manon", kiu elŝiru ĉion neutilan, por ke ni ne havu lingvajn disputojn, ĉar ni bezonas niajn fortojn sur la klasbatala kampo por la proletaro!

K-do *Slezak* prelegas leteron de k-do Kerr (el Usono), kiu plendas pri multaj vortoj ne troveblaj en vortaro. La Viena SAT-anaro, okupinta sin pri la lingva demando, sin esprimis kontraŭ superfluaj neologismoj en esp-o, kontraŭ ŝanĝo de strukturo de SAT, kaj por koncentrigo de la propagand- kaj varblaboro. La redaktoro ricevu permeson, forigi ĉiujn neologismojn. K-do *Guma* opinias, ke novaj formoj estas tolereblaj, se ili estas bazataj sur la Fundamento. "La Lernanto" donu legaĵojn en klasika stilo. Li citas kelkajn vortformojn, kiujn li opinias taŭgaj (ekz. mallongigon de "kaj"). K-do *B.* (el Blanka lando): La lingvo estu prefere iom pli malfacila, sed fiksa, neŝanĝebla. Ni ne faru longajn lingvajn diskutojn, sed laboru praktike per esp-o por la laboristaro. Krei unuecan lernilon por ĉiuj lingvaj teritorioj ŝajnas tre malfacile. La rekta metodo estas aplikebla. Sed en 90% mankas la kapablaj instruantoj. SAT ne estas la ejo por lingvaj eksperimentoj.

Itala SAT-ano: Italaj k-doj deziras, ke la gazetoj de SAT konservu sian klasan karakteron, ke la nuna organiza formo de SAT restu konservata, kaj ke la lingvo restu, kiel ĝi estis kreata de Zamenhof.

K-do *Revo* parolas kontraŭ la mallongigo de "kaj", pro estetikaj konsideroj. K-do *Klopfleisch* (komisie de k-do Deubler): La Münchenaj kaj sudbavaraj SAT-anoj ankaŭ esprimas sin kontraŭ la reformoj de la lingvo.

K-do *Guma* opinias, ke oni post kelka tempo kutimiĝos (laŭ estetika vidpunkto) al la mallongigo de "kaj", sed ne insistas pri la afero.

K-do *Feith* parolas por la pli longaj formoj, ĉar ili pli facile estas legeblaj ol la mallongaj. K-do *Guma:* "enda" oni akceptis kiel pli mallonga formo (anst. devas esti -ota).

K-do *Scheithauer* (nome de la Proponkomisiono): Pri la lingva afero estas faritaj tre multaj proponoj. Kelkajn preskaŭ samtendencajn la komisiono kombinis. La komisiono proponas por akcepto kiel ekstrakto la jenon:

"*Konsiderante la nunan staton de nia Asocio kaj konsiderante la evoluiĝeblecon de esp-o inter laboristaro, la Kongreso konstatas, ke esperanto sufiĉas por ni, kiel ĝi estas ĝis nun. Lingvajn kompletigojn, kiuj montriĝis necesaj kaj kiuj estas enkondukataj per praktika uzado, ankaŭ uzu niaj organoj. Prilingvaj diskutoj ne plu aperu en S-ulo, sed en Senn. Revuo.*"

K-do *Feith* opinias, ke "lingvaj diskutoj" ankaŭ ne estas necesaj en Senn. Revuo.

K-do *Lanty* klarigas, ke S. R. havas sciencan parton, sub kiu oni diskutu ankaŭ lingvosciencajn temojn. En la tekstoj tamen oni

ne uzu la novaĵojn. K-do *Revo*: Lingvaj diskutoj estas necesaj. Ekzemple por ekonomiaj artikoloj ni devas serĉi novajn vortojn.

K-do *Lerchner* klarigas, ke temas nur pri scienca traktado de lingvaj temoj, kiun oni devas permesi en S. R.

La propono formulita de la komisiono estas unuanime akceptita.

Radio-Salutoj el Moskvo

Moskvo. Jaŭde, la 13an de aŭgusto en „Pravda" aperis publika protesto kontraŭ la ago de aŭstria registaro, per kiu ĝi rifuzis envojaĝpermeson al Sovetiaj SAT-anoj, intencintaj partopreni la kvinan Kongreson. La saman tagon per la plej potenca radiostacio („Moskva je la nomo de Komintern") estis radie transdonita al Vieno salutparolado al la SAT-Kongreso. La paroladon faris K-do Demidjuk.

Pro manko de loko ni nur aperigas unu alineon el la radioparolado de Moskvo. Jen:

La registaro de la kongreslando ne deziris, ke nia voĉo aŭdiĝu en Vieno. La registaro de l' kongreslando opiniis malhelpi per tio nian proletan solidarecon, ĝi sentis ke ni jam venkis la lingvajn barojn, ke la diverseco de lingvoj ne plu povas malhelpi nian solidarecon kaj ĝi fermis antaŭ ni la landlimojn por ke nia voĉo ne aŭdiĝu en Vieno.

Kaj, malgraŭ tio, ni hodiaŭ sendas al vi per radio-ondoj nian voĉon, nian saluton, nian kelkminutan almenaŭ partoprenon en via laboro. Kaj tio estas la unua fojo en la historio de laborista movado ĝenerale, ke malgraŭ la fermitaj antaŭ ni landlimoj nia voĉo povas tra la distanco aŭdiĝi inter vi! Nia komuna lingvo en kunlaboro kun la progresanta tekniko ne plu havas barojn por manifesti nian sennaciecan solidarecon.

Kiel ni propagandu SAT?

Legante la multajn kaj oftajn artikolojn pri organizformo de SAT, pri nia prilingva starpunkto ktp., mi ofte pensas: kial do oni tiom multe parolas pri tiuj aferoj. Se SAT ankoraŭ ne estas sufiĉe forta kaj multmembra, tio ja ne dependas de ĝia organizformo aŭ ĝia prilingva starpunkto, sed de la nesufiĉa aktiveco de multaj el ĝiaj membroj.

Tial mi proponas al la k-doj: ne parolu aŭ skribu tro multe pri ĉi tiuj temoj, sed agu, laboru, propagandu.

En Nederlando kelkaj diverslokaj k-doj fondis Rondon por SAT-propagando, pagante ĉiumonate 20 — 25-cendan kotizon al ĝi. Per tiu ĉi mono ni eldonas ĉiumonatan cikilostiligitan folieton "La SAT-Propagandisto[1])". En tiu ĉi gazeteto ni publikigas artikoletojn pri SAT, reklamojn por SAT-organoj kaj SAT-libroj, sciigojn pri novoj SAT-eldonaĵoj ktp. Ni sendas ĝin al ĉiuj lab.-esp.-grupoj en nia lando, al SAT-anoj, al Sennaciulo-legantoj ktp. Tiamaniere ni esperos iom post iom kreskigi la SAT-movadon en Nederlando.

Ĉu ankaŭ alilande aŭ aliloke ne estus farebla io tiurilate? K-doj, pripensu. Ne nur parolu, prefere agu! *670.*

[1]) Interesuloj petu ekzempleron, sendante respondkuponon al k-do J. M. Duinker, Doolhof 3, *Den Helder (N. H.)*.

Kamaradoj ĉiulandaj! Por "Kabineto de Lingvoscienco" en Laborista Fakultato estas bezonataj specimenoj de plej diversaj lingvoj kaj de pres- kaj skrib-alfabetoj. Sendu, kiu povas, specimenojn de nacilingvaj broŝuretoj, gazetoj k.t.p. (precipe estas dezirataj orientaj alfabetoj — arabaj, hindaj k. a.). Estas ankaŭ tre dezirataj p. kartoj, duone skribitaj nacilingve kun traduko esperanta. Ĉio estas akceptota kun danko.

Sendu laŭ adreso — *Viatka (Sovet-Unio) Engels-str. 52, kv. 2, al K. P. Suhanov.*

Leĝeco estas nur perforto

Oni devus tamen fine malembarasiĝi je l' sofismo ŝatata de l' oficialaj paroladistoj, kaj kiu konsistas kontraŭmeti la perforton al la leĝeco. Kvazaŭ la leĝeco ne estas la perforto! la tipa perforto, la perforto seninterrompa kaj sistema, la perforto leĝigita kaj sanktigita, sed tamen la perforto! La neleĝa perforto kontraŭiĝas je l' leĝeco nur kiel du perfortoj kontraŭiĝas unu la alian, kaj ne kiel la perforto kontraŭiĝas je l' paco.

Ĉiuj socioj organizitaj estis fonditaj ĝis nun sur la ekspluatado de homo per homo. Tiu ekspluatado nur daŭras per la perforto. La ekspluatata homo forigus tuj la ekspluatadon, kies ĝi estas viktimo, se ĝi ne estus trudita per la perforto. La leĝeco nur estas la kodigo de l' perfortaj agmanieroj aplikendaj por daŭrigi la ekspluatmanierojn de iu socio.

* * *

La antikva socio estis fondita sur la sklaveco. Kiu riskos nun firme aserti ke sklaveco ne estis perforta ago? Perforte la sklavuloj estis konkiritaj, perforte ili kaj ilia idaro estis daŭre disponitaj de siaj posedantoj. La forkuranta sklavulo perforte estis rekondukita al sia mastro. La sklavulo malkonsentinta labori estis torturita. Ĉi tuta perforto estis nur la rigora apliko de l' leĝeco.

Uzante la specialan terminaron de niaj radikalaj burĝoj, oni devus do nomi "perfortemulo" la sklavulon provintan sin forsavi de sklaveco, kaj "pacemulo" tiun, kiu tie lin tenis.

Nu, se nuntempe la ekspluatmanieroj de homo per homo aliformiĝas, se ili estas pli insidaj, tamen ili ekzistas; kaj nuntempe, same kiel antaŭtempe, ili daŭriĝas nur per la perforto, la tradicia perforto, la leĝa perforto.

Ni rememorigu la gravajn principojn.

Ĉe l' kapitalista socio, la homo ne plu havas la posedrajton pri homo, sed ĝi havas rajton al si proprigi produkt- kaj vivrimedojn. Rezultas el tio, ke ĉiuj produkt- kaj vivrimedoj ekzistantaj en la mondo fariĝis la ekskluziva posedaĵo, la monopolo de limigita nombro da uloj. La granda maso de aliaj, de tiuj, kiuj — ĉar ili ne estas el tiu klaso — trovas neniajn produkt- kaj vivrimedojn disponeblajn, estis trudataj, je puno de morto pro malsato, sin fordoni al la unuaj, fariĝi "memvolaj" sklavuloj de l' posedantoj de l' produktrimedoj. De tiam, kiel siaj antaŭuloj, t. e. la posedintoj de sklavuloj, ĉi kapitalistoj havas la eblecon aljuĝi al si tion, kion produktas la laboro de iliaj sklavuloj, t. e. la salajruloj. Same kiel la antikva sklaveco, la moderna proleto estas kontentiĝonta per la "konserva porcio", kiun al li liveras la mastro por ke li povu daŭre produkti kaj ŝviti profiton.

Kio tion permesas? Pro kio la homo, kiu ne posedas terparton, ne povas sin instali sur nekulturata terparto, kaj kulturi ĝin por nutri sin kaj siajn samfamilianojn? Pro kio la laboristo ne povas finsemajne ricevi sian tutan laborprodukton? Pro kio li estas trudita allasi al la kapitalisto parton el la valoro, kiu estas faraĵo de liaj manoj? Pro la perforto! Se proleto, t. e. unu el tiuj, kiuj nur posedas sian laborforton, ekmaltimus voli produkti sen la permeso de tiuj, kiuj posedas posedaĵdokumentojn, se salajrulo intencus konservi por li sian tutan laborproduktаn, la perforto proteste kontraŭstarus antaŭ ili laŭforme de ĝendarmo aŭ de malliberejgardisto. La burĝaro vane klopodas kaŝi la realaĵon per konfuzamasaĉo de subtilaj ideoj kaj maldelikataj pompoj, ĝi vane klopodas helpe partoprenigi malsimplajn kodojn kaj talarulojn, la tuta funkciado de ĝia "sociordo" nur estas certigita per la revolvero de ĝendarmaĉo kaj per la ŝlosiloj de kaporalo.

Kiam la mastro perforte prenas, dum la pagtago, parton el la laborprodukto de siaj laboristoj, nur donante al ili salajron kiu valoras malpli ol tio, kion ili produktis, li ne agas alimaniere ol la rabisto, kiu elrabas sian viktimon. Ambaŭ perforte agas. Tiu ĉi agas minace de sia revolvero; kaj tiu agas minace de ĝendarmo kaj de malliberejo.

La neleĝa perforto estas tiu, kiu kontraŭas al la leĝa perforto. Kiam la malleĝa perforto superas la leĝan perforton, la sociordo fondita sur tiu-ĉi estas malaperonta. Nova sociordo stariĝos, bazota sur la nova perforto, kaj *ĉi-perforto malĉesos daŭrigi sian ekzistadon.* Sed triumfonta, ĝi sin nomos de nun "leĝeco". En ĝia nomo de nun oni anatemos[1]) la novajn formojn de l' perforto, kiujn edifos tiuj, kiuj volos sin defendi kontraŭ ĝi.

La ekspluatatoj, kiuj aspiras rezigni la perforton, realece estas nur tiuj, kiuj akceptas obei al ĝi. Ne estas pacemuloj kaj perfortemuloj. Estas nur tiuj, kiuj rezignas je l' perforto trudita al ili, kaj tiuj, kiuj rifuzas ĝin.

R. Louzon

Esperantigis Johano 1771.
El la franca revuo de popoledukado "Emancipita Lernejo".

1) malbenos, kondamnos, persekutos (vortoj kun parenca senco). Red.

KRONIKO

Estonio

Tallinn. La 25. VII. nian urbon traveturis ĉ. 300 svedaj gekamaradoj, ekskursintaj al Sovetio, el ili 8 SAT-anoj. Bedaŭrinde svedaj kamaradoj ne antaŭsciigis nin kaj nur dank' al hazarda renkonto de l' raportanto, ni sukcesis kolektiĝi kvinope ĉe la albordiĝejo, kie ni pasigis agrablan horon en kamaradeca SAT-rondo. Al la vizitintoj nian sennaciecan saluton! *1929.*

Germanio

Schweidnitz. E-movado, inter laboristaro, estas vigla. La delegitaro en la urba parlamento malaprobis peton de la Lab. E.-Grupo (peto doni 50 mk. por propagando) ĉar — E. ne estas kulturideo! La Lab. E.-Grupo aranĝis montran keston (por propagandajoj) kaj E.-oficejon (por lab. E.-aferoj). La estraro de la sindikataro donacis 25 mk. al la grupo. Dum granda kunveno de la I. L. H. salutis k-do S. la oratoron Chen Ting Ku (el Shanghai) en Esperanto kaj germane. K-do S. atentigis la k-don el Ĉinio pri Esp. kiel lingvo de la proletaro tutmonda. La ĉina k-do dankis kaj promesis, propagandi por ĉi-tiu celo. — Okaze de la fondiĝfesto de la I. L. H-grupo en nia urbo, 3 k-doj prezentadis teatrajon "Ĉu helpas la I. L. H. per E.?" Bona aplaŭdo estis la sukceso. — La I. L. H.-grupo deziras korespondadon per E. kun grupoj de I. L. H. en eksterlando. Skribu al k-do Siegert *(1851).*

Bavarlando LEA Distrikto okazigos en Schweinfurt la 12. vespere kaj 13. de Septembro la VIIan Distriktotagon kaj invitas ĉiujn k-dojn de la koncerna regiono. Estos pritraktata: Raportoj pri la Distrikto, Kongreso en Wien kaj de la grupoj; aŭtunpropagando kaj instrumetodo; distriktaferoj. Oni anoncu sin ĉe k-do Bumm, Heinrich, *Schweinfurt,* Theresienstr. 5. Proponoj rilate al la temoj traktotaj estu sendataj al k-do Deubler, Konrad, *München,* Arcisstr. 48, II.

Francio

Lyon. Tuj sciinte pri la afero Crouch-Trumbull, la Esp. laborista grupo ĝenerale kunvenis. 40 k-doj indigne protestis kontraŭ la juĝo de l' militribunalo en Honolulu. Protestletero tuj estis sendita al Usona ambasadoro en Paris. Ni publikigis deklarojn, artikolojn en gazetoj kaj zorgis por organizi seriozan kaj gravan agitadon en la tuta regiono. Plezure ni sciis pri mallongigo de l' kondamnoj de niaj 2 k-doj. Tamen, la 26. de julio, ni partoprenis mitingon de Lyon'a komitato de I. R. H. Ĉeestis pli ol 2000 personoj. Krom la oratoroj de l'organizajo parolis k-do Roux pri la proceso, klarigante ĉion, kion jam presigis "Sennaciulo". La indigno estis granda kiam la ĉeestintaro sciis ke Crouch havis 40 jarojn kaj Trumbull 26 jarojn da punlaboro, ĉar ili estis esperantistoj kaj komunistoj. Sed R. montris ke forte organizita kaj protestema laboristaro povas sukcesi kontraŭ burĝaro. La mallongigo de l'kondamnoj pruvas tion. La sukceso de tiu parolado estis tre grava kaj favora al I. R. H. kaj esperanto, grandkvante, la lernlibroj estis venditaj! — La grupo oficiale partoprenas la batalon kontraŭ maroka milito kaj dum kongresoj kaj mitingoj kiuj estos organizitaj ni pruvos ke, krom esperantistoj, revoluciemuloj ni ja estas.

Sovet-Unio

Kiev. Antaŭ nelonge, ni, Kievaj esperantistoj, je nia granda mirego tralegis en Radio-Ĵurnalo N-o 24 (Novajoj de Radio) „Novosti Radio" en Moskvo, ke Kieva Radio-Stacio aplikas internacian lingvon "Ido" kaj eĉ respondas en "Ido" al ĉiuj farataj demandoj. La korespondajo estas eĉ ilustrita per fotografajo de "iuj idistoj". Ni tre bone konas la agad — kaj labormanieron de idistoj kaj ne dubis pri malvero de ĉi noteto.

Tamen ni, por senmaskigi ĉi "honestajn amikojn" de internacia lingvo, nin turnis oficiale al Kieva Radio-Stacio. Jen estas ĝia respondo:

"Al Kieva Gubfako de SEU.

Responde je N-o 41, mi sciigas, ke la noteto estas presita en la ĵurnalo "Novosti Radio" (Novajoj de Radio) N-o 24 de studento K. P. I., k-do Ŝaparenko, kiu veturis N. Novgorodon tra Moskvo por praktikaj laboroj.

Ĉi noteto estis lokita, verŝajne, kiel liaj personaj konsideroj sen iaj rajtigoj kaj bazo.

Estro de Kieva Radio-Stacio Ĥomenko.

29. VII. 1925 jaro."

Nia mirego estis des pli granda, ke nia Kieva fako de S E U laŭ la invito de R. Stacio antaŭ kelke da tempo organizis en Stacio esper-kursojn por radiistoj kaj nun ni intertraktas pri organizo de esper. kursoj en la stacio laŭ sistemo de Moskva Stacio M G S P S.

Por denove kaj denove substreki la fiagadon de idistoj, Kievaj esperantistoj petas ĉiujn esper. gazetojn represi ĉi-leteron.

RECENZEJO

Represis el S-ulo: *Der Freidenker,* Essen, julio, La lingvo de dio (S. 29), *L' Internationale de l' Enseignement,* Paris, n-o 9/10, Analfab. en Sib. (S. 18), Lernejoj en Italio (S. 32), Assurance Agents Chronicle, Manchester, 22. 8., Alvoko el Ŝanhajo (S. 41).

Represis el S. R.: *Naturfreunde-Mitteilungsblatt,* Remscheid, julio, Sekretoj de Danubo (majo).

Enpresis div. artikolojn kaj notojn: *L' Ecole Emancipée,* Paris, aŭg., pri broŝuro de Lanty, *Brandenburger Zeitung,* Brandenburg, 6. kaj 7. 8., pri SAT-kongreso kaj Esp. en Sovetio, *Die Einheitsfront,* Breslau, junio, *The Socialist Review,* London, aŭg., art. de M. Starr.

Nova gazeto. *Libera Laboristo.* Oficiala organo de TLES (Tutm. Ligo de Esp. Senŝtatanoj). Adm. A. Bolle, Tresckowstr. 58, *Berlin N. 58.* — N-o 1 aŭgusto 1925 — 16 pĝ.

La skismanoj aperigis la unuan numeron de nova, provizore dumonata gazeto, kun artikoloj de anarkista tendenco. La agmaniero de la k-doj respondecaj pri tiu disbato de niaj fortoj publike estas sufiĉe karakterizita dum la Va kongreso en Vieno. Oni legu atente la tiurilatajn tekstojn en la "Kongresa Protokolo".

Solvo de la enigmoj en n-o 47.

El la literoj, kiuj konsistigas la karikaturojn, oni povas formi la jenajn vortojn karakterizajn: 1. Kapitalisto, 2. Mensogulo, 3. Faŝisto, 4. Nobelo, 5. Espero . . . . . .

Aŭtoro: *V. Kuzjmiĉ,* Kremenĉug (3975).

Ni protestas!

Aŭstria registaro malpermesis al niaj rusaj kamaradoj ĉeesti la V. SAT-kongreson.

Ni, smolenskaj esperantistoj, kvankam ankoraŭ ne unuiĝintaj ian grupon, aligas nian voĉon al la protesto de CKSEU je okazo de ĉi-malpermeso.

Ni diras al la Aŭstria registaro: malgraŭ via malpermeso, malgraŭ penoj de kapitalistaro malhelpi firmigon de l' tutmonda proletara solidareco, vortoj de vero pri Soveta Unio, skribe kaj dire, tra montoj kaj oceanoj, per tero, aero kaj akvo trafos mensojn kaj korojn de niaj alilandaj fratoj.

Ni promesas de hodiaŭ plifortigi nian korespondadon kun alilandaj laboristaj esperantistoj kaj entiradi en ĉi-korespondadon niajn rusajn laborkorespondantojn.

Vivu SAT, signo kaj simbolo de l' tutmonda laborista solidareco!

Nikolskij, Sikorskij kaj Griŝin.
Smolensk, Sovet-Unio.

Alvoko

En septembro de k. j. en Lodz estas aranĝota granda Esperanta Ekspozicio. La Ekspozicia Komitato turnas sin kun varma peto al Tutmonda Esperantistaro, pri alsendo de diversa ekspozicia materialo, speciale statistiko kaj gazetaro. Bezonataj estas fotografajoj de konataj esperantistoj, por disvolvo de Esp-o decidoj akceptitaj de diversaj institucioj, gazetoj en diversaj lingvoj kun E-anguloj, gvidiloj ktp.

La E. K. garantias la resendon de materialo se oni petas tion kaj rekompencos ĉiun sendinton per memorajo.

Adresu la sendajojn al sekretario:

D. Patt
Lodz (Polio), ul Nowo-Cegielniana 7 m.

Saluta letero.

Ni ruĝarmeanoj, komandoroj kaj politikaj gvidantoj de Kazana regimento, en tago de sepjara datreveno de formado de la regimento, sendas niajn fratajn salutojn al laboristoj kaj kamparanoj de la tuta mondo.

Ni forte tenas pafilojn en niaj manoj kaj ĉiam estas pretaj, helpi al tutmonda laboristaro en batalo kontraŭ atako de burĝaro.

Vivu forta ligilo inter laboristoj kaj kamparanoj!

Vivu Internacionalo, kiel gvidanto de la tutmonda laboristaro!

Vivu tutmonda revolucio!

9. VIII. 1925 *Kazana regimento.*
Krasnojarsk (Sovet-Unio)

Laŭ komisio de Administracio de la regimento tradukis en Esperanton ruĝarmeano Zuj, Jakobo (4112).

PRESEJO: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG (GERMANIO)